

Heinrich Heine,
Lorelay

*tradukita de Hans-
Georg Kaiser*

Heinrich Heine,
Lorelej'

*tradukita de Leopold
Elb*

Heinrich Heine,
Lurleia

tradukita de N. N. 01

Heinrich Heine,
Lorelejo

*tradukita de Joachim
Gießner*

Tiu traduko estas poste iom modifita de alioj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.

Min kaptas malgaj' en
la koro,
pro kio tia trist'?
Fabel' el antikva foro
ne lasas de mi kun per-
sist'.

Aere fridetas, trankvi-
las,
malhelas jam la Rejn'.
La monto surpinte bri-
las
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,
jen supre por ador';
la ora ornamo ridas;
ŝi kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora kom-
bilo
kaj kantas kun pasi';
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l' melodi'.

...

Ne scias mi, kial mi
estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia me-
mor'.

Vespero jam ekmalhe-
liĝas,
Fluadas la Rejn' en
trankvil',
La supro de l' monto
lumiĝas
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen
tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon kro-
nas
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el
oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

...

Ignoro, quid id sibi
velit,
Tristissimus cur sim,
Antiqui aevi fabel-
lam
Cur saepe volverim.

Vesperascit et friges-
cit,
Et Rhenus leniter it,
Cacumen montis lu-
cescit,
Dum Phoebus occi-
dit.

Sedet in summo
montis
Virgo pulcherrima,
Auro nitet gemma
frontis,
Se pectit auricoma.

Aureolo pectine pec-
tit,
Carmen canens pro-
cul,
Mirandum id habet
modum
Nec non virilem si-
mul.

...

Malgajon mi sentas en
koro,
sed kial tia tim'?
Legendo el pratempa
foro
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en
malhelo,
kaj malvarmetas l' aer'.
Sed brilas la mont' en
orbelo
pro suna lum' de l' ves-
per'.

Jen supre kabino pro-
vokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas
sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, mirige
potenca melodi'.

...

Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve' de ek- zalt'.	Kaj sopiregon eksen- tas	In cymba navitam mille	Ŝipiston en eta boato Turmentas koremoci'.
Li ja la rifojn ne vidas', li vidas nur supren sen halt'.	Ŝipisto dum sia vetur'; Rifaron li ne priaten- tas, Al monto rigardas li nur.	Angores feri tenent, Non videt scopulos il- le, Ocli non si sursum vi- dent.	Ne ĝenas lin rifo- kaskado, rigardas nur supren al ŝi!

Mi kredas, ke ondoj ti- ras	Mi kredas, ke dronos finfine	Opinor undas de- vorare	Ĝis tiras kun si al Rejn- fundo
la ŝipon funden de l' Rejn';	Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine	Nautam cum navicu- la,	la ondoj lin kun boat'.
kaj tio de l' kant' eliras de Lorelaj-siren'.	La Loreleja kantad'.	Effecit solo canendo Lurleia id dea.	Nun kuŝas li en la pro- fundo pro Loreleja kantad'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Latinan de N. N. 01.*

Arg-2-179 (2010-02-11 14:00:52)

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfsstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: Josef.Schiffer@t-online.de), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo3.